

## ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
WYDAWCAREDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZYAPERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI  
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.*Iom pri novaj eblecoj  
de Esperanta Propagando en Eŭropo.*

Nia propagando malvigligas kaj ankaŭ societa vivo anemiigas. Mankas konvena iniciatemo, senefikaj klopodoj de estraroj, materialaj malfacilaĵoj kaj alispecaj malhelpoj, inter kiuj malvolontiĝo kaj seninteresiĝo de propraj anoj kaj de pli vasta publiko ĉi ĉio grave difektas nian laboron. En nia praktikema mondo oni ĝenerale ne emas al senlaca talpa laboro, kies efikoj eble-eble estos atingitaj de niaj nepoj. Kaj ne mirinde: niaj propagandmetodoj perdis ĉarmon de noveco kaj pro tio efikas malmulte.

Sed mi opinias, ke en nia movado estas kaŝitaj fontoj, kiujn ni povus utiligi por ĝia bono. Mia ideo certe ne estas nova, sed novevestita. Tiuj fontoj neelĉerpeblaj troviĝas en miloj da gekongresanoj, kiuj ĉiujare dokumentas sian esperantistecon. Sed ĉu ili krome neniam alian celon havas. La respondo estas klara: ĉiu esperantisto veturanta kongreson volas iom turismumi, tion pravas ne nur fotoaparato sur brusto de multaj kongresanoj, sed ankaŭ tio, ke eĉ malgranda landa esp. kongreso aranĝas ian vizitadon al vidindaj lokoj, aŭ ekskursoj. La praktiko de ekskursaranĝado dum kongresoj konstante plivastiĝas. Ni do fine devas konkludi, ke unu el plej gravaj kongresallogaĵoj estas eblo de ioma turismumado en vizitata lando. Tiun ĉi eblon kaj emon ni devas kaj rajtas ekspluati por bono kaj akcelo de nia movado. Kiel tion fari mi tuj klarigos.

Multaj esperantistoj estas laboruloj,

kiuj speciale klopodas ricevi forpermeson por partopreni la kongreson. Pri aliaj mi ne devas paroli, ĉar por ili mia ideo estas ankoraŭ pli facile aplikebla. La forpermeso daŭras kutime unu monaton, kaj por la kongreso ordinare sufiĉas dek tagoj; sed mi estus certa, ke se la kongresano povus pli longe aŭ eĉ tutan tempon pasigi en kongresa aŭ aliaj landoj sen troa elspeziĝo, li certe tion farus. La afero estas aranĝebla tiamaniere: kongresaliĝanto jam en aliĝilo esprimas sian pretemon prelegi pri propra lando aŭ urbo en aliaj landoj, kiujn li devas trapasi post kongreso, kaj lia nomo estas publikata en listo kun konforma mencio. Esperanto-societo de unu aŭ kelkaj el tiuj landoj interkomunikiĝas kun li kaj fiksas kondiĉojn de la prelegciklo en kelkaj lokoj. Kondiĉoj devas esti kiel eble plej malaltaj, do: diferenco de vojaĝkostoj kaŭzita de devojiĝo, aŭ vojaĝhalto kaj diferenco de vivtenadaj kostoj. Ĉe bona organizo kaj komuna bona volo, ili povas esti ne tro altaj, ĉar tiu okazo viziti la urbon kunigita kun aliaj avantaĝoj povas esti rekompencita per konforma malaltigo de kostoj. Nun venas plej grava argumento: postkongresa tempo bonŝance antaŭeniras la aŭtunan agadsezonon, tiel ĝustatempe fari taj prelegoj povas havi tujan konsekvencon: aranĝon de kursoj kaj plivigliĝon de societa vivo. Kompreneble ĉi tie temas ne pri prelego por esperantistoj, sed por pli vasta publiko. La esperantlingva pre-

lego devas esti tuj pofraze tradukata de sperta esperantisto, ekzemple delegito de UEA., aŭ alia lingvospertulo.

Nun mi ne parolas pri detaloj de okupigado pri l' gasto, tio dependas de organizantoj, sed mi volas pritaksi, kiajn sekvojn povas havi tiaj aranĝoj.

Unue, en lando aŭ urbo, kie estos aranĝitaj prelegoj, estiĝas plivigliĝo en societo esperantista ligita kun aranĝo de prelego, kaj interesiĝo de neesperantista publiko, kiu estas konvinkata pri utilo praktika de Esperanto, vidinte proprokule homon, kiu sendube per ĝi havas praktikan utilon, kaj multajn aliajn avantaĝojn, alimaniere neatingeblajn kaj sen iaj troaj elspezoj. Al tio aldonu tujan eblon aranĝi kursojn por plenaĝuloj kaj ankaŭ por lernantoj, kiuj povas daŭri ĝis printempo.

Due, preleginto post reveno patrujon, spertinte pli multajn impresojn, aranĝas tie aŭ estas invitita aranĝi de urba aŭ landa societo esperantista prelegon pri la kongreso kaj vizititaj urboj. Tio siaflanke plivigliĝas ĉi tie societatan vivon, faras propagandon same aŭ eĉ pli efikan kaj ties sekvo ne estas kursoj. Landa organizo, se ĝi estas sufiĉe forta, povas eĉ subvencii liajn prelegojn en alia lando, aŭ eĉ partoprenon de kongreso, kaj repreni tiun ĉi subvencion en formo de prelego, kiu se mem ne donos sufiĉan mongajnon, tiam donos ĝin sekvonfaj kursoj. Kaj ĉu morala gajno estas dubata? La prelegoj lastemenciitaj kompreneble ne devas esti esperantlingvaj sed prelego povas esti nacilingva.

Valoras aldoni, ke similspeca propagando por propra patrujo de preleginto valoras subvencion aŭ nur moralan akcelon de landa neesperantista organizo. Kaj ĉu en tiu ĉi punkto ne koincidas ĝuste la vera patriotismo kun esperantismo kaj ties interna ideo? Nun la mondo multe naciemiĝas kaj oni devas lin ekataki sur tiu ĉi platformo. Alie oni devus tro longe kaj senrezulte persvadi al ĝi

la avantaĝojn de nia lingvo — tiun ĉi praktikon ni faradas de preskaŭ 50 jaroj. Turismo tiom longe ne ekzistas — sed rigardu, ĉu turistoj ne estas pli multaj ol esperantistoj. Se ni, esperantistoj, donos al ili tian ekzemplon, ni ilin konvinkos por nia ideo kaj per tio pliakcelos nian venkon.

Kaj eĉ se ni ne estos tiurilate troaj optimistoj, ni tamen povas esti certaj, ke estos rompita stagnado kaj seninteresiĝo en esperanto-societoj.

Ni bone memoras prelegciklon de L. Sinha kaj K. Ajayi. Kvankam aranĝitaj en ne konvena tempo — ili estis sukcesaj. Sed ni ne devas nun elekti nur ekstereŭropanojn.

Kompreneble unuaj provoj devas esti farataj singardeme, elekteme koncerne personojn — kiuj devas esti spertaj, opiniitaj konforme de l' societoj, kaj komence en malgranda skalo. Nur se ili estos sufiĉe sukcesaj, oni povos pligrandigi la skalon. La internacian organizon de la prelegoj povos gvidi UEA, aŭ L.K.K.

Se la unuaj provoj estos bone organizitaj kaj sukcesaj, ties efikoj publikigitaj en esperanto-gazetoj povas volontigi al vizitado de kongresoj kaj perfektigo en nia lingvo. La temoj povas ja esti prilaboritaj de aliaj pli spertaj esperantistoj, kiuj ne havas monon por partopreni kongreson, aŭ eĉ tradukitaj el nacia lingvo, tamen la prelegonto devas bone posedi esperanton por povi flue respondi la postprelegajn demandojn. Bone estus, se prelegoj estu akompanataj de lumbildoj.

Ĉi tiun ideon mi transdonas en manojn de kompetentuloj, ili utiligu ĝin por bono de nia movado. Eble ĝi estu publikigita en gazeto, por ke pli vasta publiko povu koniĝi kun ĝi kaj ekopini. Eble nunjare ni povos fari unuajn provojn? Eble ĝi povos esti preparolita dum la kongreso? Kaj tamen eble ĝi ne estas maltaŭga, kaj valoras fari provon.

Inĝ. Michał Chmieliński.

## LA ESPERANTISMO EL LA VIDPUNKTO DE NE-ESPERANTISTA PUBLIKO.

Juna persono hazarde ie aŭdis aŭ legis pri Esperanto. Li (aŭ ŝi) subite ekinteresiĝis pri tiu ĉi problemo, aĉetas lernolibron, rapide eklernas la lingvon, poste eniras esp. organizaĵon, opiniante, ke la personoj tie ĉi troviĝantaj estas de

la kapo ĝis la piedoj tute kovritaj per verdaj steloj, li endroniĝas ĝiskape en esp. idealaron, kiu komencas lin nerve ekposedi, li sentas sin kvazaŭ infektita per ĝi. „Verdajn baciolojn“ li kvazaŭ sentas kuri en sia sango. Li jam ne plu

povas sin ne-okupi pri ĝi. Ofte okazas, ke esperantismo tiel profunde encerbiĝas en li, ke li flanken lasas aliajn necesajn okupojn, pri kiuj li devus unu-grade zorgi, ĉar ili gvidas lin al la estonta viv-subtena posteno. Ĉiu artikolo, mencio nefavora ol esperanto estas kvazaŭ lia propra ofendo, kiun oni devas nepre kaj tuj kun indigno respondi. Li gvidas la kursojn, li abonas la esp. revuojn, li prelegas, propagandas kaj miras, kial la mondo ne komprenas la gravecon de esperantismo.

Forpasas la jardekoj. Junulo fariĝas matura persono. Li ne ĉesis esti esperantisto, li ne ĉesis legi la gazetaron Esp. k.t.p. Ne! Sed malgraŭ tio ĉi ŝanĝiĝis en li la perspektivo. Naskiĝis io nova, kio kvazaŭ antaŭe ne estis: alia vidpunkto.

Li jam satoriĝis per idealaro Esperanta. Li parkere scias ĉiujn argumentojn kontraŭ ĝi kaj la respondon, kian oni devas al ili doni. La lingvon li jam de longe konas tiel lerte, ke ĝi ne prezentas al li ion tro novan krom eble la specialaj demandoj, ekzistantaj ankaŭ en ĉiu alia lingvo. Kongresojn li volonte vizitas, sed ili ankaŭ estas por li la manifestacio de io, kion li jam multfoje vidis kaj vidos.

La Esperantan gazetaron li legas, sed en ĝi li trovas la sciigojn pri kursoj, novaj delegitoj de UEA, pri kio li legis antaŭ jaroj, kaj pri la forapero de aliaj. Statistikon li ne legas — ĝi **bedaŭrinde ne ekzistas**. La manka flanko de nia movado. Certe! Mirinde, ke neniu zorgas pri ĝia aranĝo. La korespondadon kun fremdlandaj esperantistoj li jam plu ankaŭ ne daŭrigas. Ĝi estas tro multekosta kaj alportas la profiton al komencantoj aŭ al specialaj kolektantoj de poŝtmarkoj aŭ bild-kartoj, sed ne estas nepra.

Iom post iom naskiĝas en li la ĉefa demando, la plej aktuala kaj ekscita: kiam fine Esperanto estos ĉie instruata? kiam ĝi fine venkos?

Sed por ke tio ĉi okazu, li komprenas, ke la publika opinio devas esti por Esp. favora kaj konvinkita. Sed ĉu ĝi tia jam estas? Problemon ne plu prezentas Esperanto mem, sed ĝia akcepto ĉe la publiko.

Li do komencas ĝin esplori. Li jam longe laboris por ĝin konvinki, longe laboris ankaŭ aliaj samideanoj. Do, ĉu iam alproksimiĝos la tempo de rikolto, ĉu ankoraŭ ne?

Li rigardas la ĝis nun elkreskintan grenon el la propaganda semo. Ĝi verdiĝas. Certe! Sed ĉu ĝi estas jam matura al la rikolto?

De tiu ĉi tempo li faras novajn malkovrojn. Li komencas esplori, kion esperantismo postlasis en la spirito de la publiko, kiel ĝi aperas en ĝi. Kaj jen kion li konstatas:

Por ne esperanta publiko la esperantismo estas antaŭ ĉio la **lingvo**. Flanke de ĝi oni povas meti aliajn provojn, kiel ekz. volapükon, idon, latinan aŭ francan lingvojn. La **movadon** Esp. la publiko ne vidas, aŭ havas pri ĝi nur malprecizan ideon. Ĝia abundeco, riĉeco de ĝiaj aperoj, diversfakeco tute por ĝi ne ekzistas. koncerne la lingvon la publiko klare ne komprenas, kial nepre devas esti la formo de la internacia lingvo tia, kian donis al ĝi Zamenhof. Kial ne alia? Ĝi tute ne komprenas, ke Esperanto elkreskas per siaj radikoj el la monda kulturo, ke, se Zamenhof ne naskiĝus, iu alia, penanta pri internacia lingvo estu malgraŭ ĉio devigata doni al ĝi principe strukturon similan al la nuna Esperanto.

Troviĝas naivuloj, kiel ekz. unu mia konato, kiu demandis min, kial Zamenhof ne prenis substantivojn el unu lingvo, verbojn el la alia. „Tiel la homo minimume sciis, de kie ion preni“. Alia persono timis, ke se Esperanto estos konata al ĉiu persono, tiam la hebreoj ne volos jam kun ni interparoli pole.

La publiko ne-esperanta konsideras Esperanton kiel la demandon de malproksima estonteco. Oni min multfoje demandis, kion signifas la stelo en mia butontruo? Mi klarigis, kion ĝi signifas. — „Do vi estas esperantisto? Ĉu Esp. havas ian estontecon antaŭ si?“ Jen ordinara demando. Tial plej ofte eĉ ne kontraŭbatalante ĝin la sinteno de la publiko rilate Esperanton estas atendema: „Mi ĝin certe lernos, kiam ĉiuj ĝin lernos“. Sed tiu ĉi momento ne venas kaj ni ne povas difini precize, kiam ĉiuj komencos lerni Esperanton.

La ne-Esperantan publikon ne interesas etaj aktoj pri la kursoj kaj personecaĵoj (latine: personalia). Ĝi postulas grandan nombron da adeptoj de esperantismo. Se tiom kaj tiom **miĵoj** da esperantistoj jam estos, tiam oni ĝin enkondukos en la lernejoj. Vana iluzio! Multaj miĵoj povas esti nur post, ne antaŭ la enkonduko. Sen ĝi ni nenion grandskalan faros.

La ne-esperanta publiko ofte nin admiras, sed ne kredas al ni. Oni nin konsideras, kiel la entuziasmulojn de iu ideo, sed kiel homojn ne kritikemajn. Kiam temus, ke la publiko aliĝu, aŭ ia-grade nin subtenu per iu deklaro, ĝi tion ĉi ne faros, kvankam eĉ „principe“ ĝi estus favora.

La ne-Esperanta publiko ne eksentas la organizitan potencon en Esperanto, similan al tiu ĉi, kian oni eksentas en ĉiu nacia lingvo, ekz. en pola lingvo la polan nacion. Por tiu ĉi publiko esperantismo estas grupetoj kaj malantaŭ ili unu mortinta persono: la aŭtoro de Esp. Tia organizita potenco ne manifestiĝas tiel ofte, kiel potencoj naciaj. La solaj tagoj de ĝia manifestacio estas la universalsalaj kongresoj Esp.

Kian ideon havas la ne-Esperanta publiko koncerne la Esp. kongresojn?

Por ilin partopreni, oni devas aĉeti la enir-karton. Tial ili ne estas vizitataj de la ne-Esperanta publiko, kiu ekscias pri ili kaj pri la kunsidoj el ĵurnalaj raportoj en la nacia lingvo. Tio ĉi daŭras kelkajn tagojn kaj se la kongreso okazas en grandaj urboj, ĝi droniĝas en la maro de diversaj aktualaĵoj kaj post ia tempo oni ĉion forĝesas krom eble la sola fakto, ke iam en tiu ĉi urbo la kongreso okazis. En la periodo de radio la situacio pliboniĝis, ĉar kelkajn paroladojn kaj himnojn oni povas transdoni per radio.

La ne-Esperantan publikon oni povas kapti ia-grade por Esperanto, aplikante ĝin por la propagando de landekono, de landa kulturo kaj de ĝia industrio. Tiam Esperanto ludas la rolon de peranto, kiun oni afable favorigas kaj protektas, sed de kiu oni postulas memfortecon. Oni laŭdas la helpon de esperan-

tistoj, sed Esperanton oni aparte intense ne subtenas.

La supre priskribita ŝanĝo de la perspektivo de juna esperantisto, kiu jam ĉesis esti juna ne okazas ĉe ĉiuj:

Mi vidis ankaŭ aliajn tipojn. Iu diras al mi: „mi ankaŭ siatempe estis esperantisto, sed mi ĉesis min okupi pri ĝi“. Se vi demandus pri la kaŭzo, li diras, ke li „ne havas la tempon“ (kiu el okupitaj personoj ĝin havas?).

Aliaj diras tute sincere: „mi ĉesis kredi. Se en esperantismo estus efektive io grava kaj viv-pova, ĝi jam delonge estus venkinta“ (aŭtentika).

Aliaj ĝenerale nenion diras. Estas facile diveneble, ke al ili imponas potenco, nombro. Per potenco ni bedaŭrinde nepovas imponi.

Plej multaj personoj el ne-Esperanta publiko senmoraligiĝas per la tro longe daŭranta ĝerma periodo de Esperanto. Ili volus, ke ĝi manifestiĝu brile sur ĉiu paŝo. „Kiam vi fine venkos?“ — „Vi venku, kaj mi tiam certe vin subtenos kaj ankaŭ diligente lernos vian lingvon, sed nun momente mi ĝin ne bezonas“.

Jen vi povas konstati, kiom multe da adeptoj ni povus havi, se ni estus finfine venkintaj, kaj samtempe vidi la nunan marĉon, en kia dronas la plej noblaj, la plej energiplenaj fortostreĉoj kaj penadoj de niaj agantoj.

Kion kontraŭdiri? Kie estas la vojo al triumf-arko de nia armeo?

Mi ĝin jam de longe montris kaj montris en sekvonta artikolo pri la iluzioj de esperantistoj. Ĝi ripozas en organizo de publika opinio favore al **Interŝtata Esperanto-Akordo**.

dr. Antoni Czubyński.

**DR. LEOPOLD DREHER.**

## LINGVA ESPLORO.

Ofta eraro ĉe polaj esperantistoj estas laŭvorta tradukado de tiaj esprimoj kiel „tymczasem“ — dume. En januara numero de P. E. ĉi-jara troviĝas unu tia „dume“. La frazo tekstas:

Tio dume ne atestas pri tre disvastigita legemo...

Devus esti: Sed tio ne atestas ktp.

(Similspeca laŭvorta traduko okazas pri „znów, znowu“ en frazoj kiel: To znów nie takie trudne. La traduko devas esti: nu, tio ne estas tiel malfacila).

Iom embarasa estas traduko de la esprimo: ograniczać się do czegoś. En citita jan. numero de P.E. ni trovas: alilingva gazetaro... limiĝas per fakaj periodaĵoj. Kompreneble, „limiĝas per“ estas pli bona ol „limiĝas al“, sed ambaŭ estas malsufiĉaj, pene kompreneblaj, kaj postulas alian verbon, ekz. alilingva gazetaro konsistas nur el fakaj periodaĵoj aŭ sim.

Iom ŝokas laŭvorta tradukado de powstawać. Anstataŭ „ekestas fabriko“



(laŭvorte: fabrikoj komencas esti), kiu estas pala, senkolora esprimo, pli konsilinde estus diri: kreiĝas, ofte: naskiĝas (pri fabrikoj ne, sed ekzemple pri ideoj).

Polismo ŝajnas esti: ne nur, ke ne... Pli taŭgas pli simpla: ne nur ne..

Speciale malfacila ŝajnas esti la artikolo „la“. Unu tian tute nenecesajn „la“ mi trovis i. a. en la frazo: „ni prezentas al... bondezirojn de l' plua ankoraŭ multjara kaj fruktodona kunlaborado“. Multe malpli peza aspektas la sama frazo sen la artikolo (apostrofita) l'.

Pli bona ol „el iliaj paroladoj montris sin, ke... ŝajnas: montriĝis (okazaĵo siĝi), ke...“

Anstataŭ „brilanta oratorino“ mi preferus: brila. Estas diferenco inter —anta kaj —a. La lasta montras ĝuste kion la aŭtoro de la artikolo celas: daŭran, konstantan econ, ne nur efemeran, momentan, kvaliton (—anta).

Laŭ mia opinio farbować estas tradukebla pli simple per: kolori, ol per: koloriĝi, ĉar laŭ Zamenhofs Universala Vortaro la radiko kolor' estas substantiva. Komparu: marteli, najli, bazi, limi (ograniczać, transitiva!) ktp. Tial ankaŭ: kolorilo, ne: koloriĝilo.

Similan trouzadon de iĝi montras: tiu kunveno konvertiĝis ŝin. La citita frazo venas ne de pola sed de anglo-amerika esperantisto, verkinta por P. E. Sufiĉas ankaŭ ĉi tie „konvertis“. La sama aŭtoro kontinuis: konvertiĝis ŝin en samideanino. Ŝajnas, ke — laŭ Zamenhofs „ŝanĝi en ion“ — oni povas diri: „konverti en ion“, ĉar ambaŭ verboj havas similan sencon.

La sama skribis: tiu edzino helpis lin finance la aperon de la libretoj... Devas esti: helpis lin finance, aperigi la libretojn... Alie ni tolerus t. n. duoblan akuzativon, en E. nekorektan.

Tute ofta ĉe okcidentanoj estas alia esprimo de la sama aŭtoro en la sama numero de P.E.: finiĝis la kunveno kantanta la Esperon. Devas esti: finiĝis la kunveno per kantado de La Espero.

Anstataŭ „fabulo“, kiun mi trovis en jan. numero de P. E. mi proponas: enhavo, temo, rakonttemo.

Anstataŭ „separataj leteroj“, mi opinias pli korekta: apartaj leteroj, ĉar ia „separi“ ne estas oficiala, aliflanke „separata“ ne povas konformi al nia § 15 de la Fundamenta Gramatiko, ĉar ĝi estas vorto internacia. Ekz. en pola

lingvo ĝi estas nekonata. Konata estas nur „separować“. Se „separi“ estus oficiala, tiakaze la vorto devus esti formata: separita. Sed „aparta“ tute sufiĉas.

En antaŭa numero de „P. E.“ mi komencis kritikan esploron de kelkaj esprimoj de „P. E.“ laŭ mi ne tute korektaj. En februara numero de „P. E.“ kelkfoje estas uzita la vorto: ĝazbando. Ĉar la originala vorto estas skribata per j, ne per ĝ, mi opinias pli korekta: jazbando.

Iu uzis „returnen“, kiu vorto laŭ Zamenhof (Lingvaj Respondoj), devas teksti ĉiam: returne, neniam: returnen, ĉar „returne“ per si mem esprimas direkton, „Subita al influoj“ eble estas preservaro, anstataŭ: subigita. Eble oni povas diri ankaŭ: elmetita al influoj, laŭ: elmetita al danĝeroj.

Malĝusta estas: kio okazas kun P.G. Servo, anstataŭ: pri.

Superfluas la en: „ĝi ankaŭ aperis en la franca traduko“. „La franca traduko“ tute ne estas konata, nek citita en la koncerna artikolo, sekve la estas nebezona.

La sama aŭtoro skribis: ĝi (la afiŝo) mezuras 60 cm. Estas klare, ke ne la afiŝo mezuras, sed homoj mezuras. La afiŝo mem estas longa aŭ larĝa je 60 cm.

„Ant'kvara kursmaterialo“ devus teksti: antikveca.

„Havigi“ oni ne uzas en la sencoj: nabyć, sed: dostarczyć. Oni devas aldoni la vorton „al si“. Sekve la tuta frazo devas teksti: antikvecan kursmaterialon havigu al vi ĉe... aŭ: akiru ĉe..

„Homoj je malfortika kritikismo“ devus teksti: homoj kun malforta kritikismo. Inter forta kaj fortika estas diferenco. Fortika montras la pasivan rezistpovon, forta la aktivan atak- kaj batpovon. Ni parolas pri la fortikeco de muro aŭ de turo, sed pri la forto de akvo aŭ de vaporo. (Argumentoj povas esti kaj fortaj kaj fortikaj: fortaj ĉar konvinkaj, fortikaj ĉar nerefuteblaj).

„Deknaŭjarcenta“ estas kiu daŭras deknaŭ sekve la koncerna esprimo devas teksti: de la deknaŭa jarcento.

„En celo por profiti“ devas teksti: kun la celo... aŭ celante profiti, aŭ simple: por profiti.

Anstataŭ: (elektita) por ilustra ekzemplo, pli bona estas: kiel ekzemplo.

Anstataŭ „priskribanta psikologio“, pli bona estas: priskriba. Ni ne forgesu tiun avantaĝon, kiu donas al ni la elverabaj adjektivoj, ĉi rilate Esperanto diferencas de Ido, kiu ne posedante ilin, estas devigita helpi sin per speciala sufikso, aŭ eĉ simple ne faras diferencon inter -anta kaj -a.

„...kies monografioj plenigas la tutan vastecon de la filozofihistorio“, d. e. kampon, aŭ simple: vaston.

„Polujo restas nek iomete malantaŭe“ estas grava eraro laŭ gramatika vidpunkto. Oni ne povas uzi „nek“ en la signifo: ne eĉ, eĉ ne!

Anst. „ni devis apogi sin“ d. e. kompreneble: nin.

Oni ne povas „transiri sur alian tipon“, sed: al alia tipo.

Anst. fiero el, pli bona estas: fiero pro aŭ pro.

## KIE PASIGI LA SOMERAN LIBERTEMPON?

Alvenis la somero, la tempo de ripozo kaj turistaj vojaĝoj. La feliĉuloj, kiuj povas eluzi tiun tempon por agrablaj kaj kuraco, ofte devas longe mediti: „kien veturi dum tiu somero, kie pasigi la nunjaran libertempon?“ Malgraŭ, ke pli facile estas trovi konvenan lokon por veturi, ol trovi rimedojn por tiu celo, multaj tamen embarasiĝas pro trovo de konforma somerrestadejo. Ĉar en la homa naturo sin trovas ia elemento de ŝanĝemo, diverseco ktp. — kaj tial, turisto aŭ alia somerumanto, preferas ĉiun someron ekkoni novan landon, novajn homojn kaj novan kulturon.

Polujo estas lando malnova, kun malnovaj historio, kulturo kaj tradicioj. Sed dum ĝia 150-jara mallibero, ĝi estis konata tra la mondo kiel Ruslando, Pruslando aŭ Aŭstro-lando, sub kies regado ĝi restadis. La jaro 1918 redonis al Polujo la nomon kaj la lokon sur la landkarto de Eŭropo.

Rilate somer — pasigon en Polujo nia lando pro la belegaj kuracejoj, ĉarmaj montaroj, regionaj moroj, kutimoj, tradicioj kaj vivo, — certe allogas ĉiun, kiu unufoje ĝin vizitis. Polujo posedas pli ol 60 kuracejojn, kaj bonegajn klimat-staciojn, situantajn en pitoreskaj regionoj kaj posedantaj tiel modernajn aranĝojn, ke la plej pretendema turisto trovos en ili kontenton. La polaj somerlokoj situas ĉe la limoj de la lando, ĉiu en alia regiono, kaj pro tio ĉiu el ili havas siajn

Anst. „personoj pli aĝaj de 16 jaroj d. e. pli aĝaj ol.

El marta numero de P. E. mi citas: „kiel ankaŭ“ anst. samkiel.

„la programo... antaŭvidas“ anst. konsistas el, enhavas aŭ sim.

„Subverdiktaj homoj“ estas neallasebla laŭvortaĵo el pola lingvo, anstataŭ kiu mi proponas: akuzitaj.

La raporto pri iu kiu: „bele deklamis la poezion de Belmont“, estas neklara, ni ne scias, ĉu temas pri unu el Belmontaj poeziaĵoj (poemoj) aŭ pri kelkaj poeziaĵoj liaj. Verŝajne la aŭtoro de la raporto laŭvorte tradukis: „poezje“ ne rimarkante ke tiu ĉi vorto ne finiĝas je -e...

Pli longa listo ol ĉi tiu sekvos en unu el proksimaj numeroj koncerne la numeron aprilan de nia gazeto.

specialaĵojn de granda valoro turista. Por faciligi la orientiĝon al la eksterlandaj samideanoj, vizitontaj Polujon, mi prezentos mallonge la plej interesajn kaj belajn somerlokojn, kie oni povas plej agrable pasigi la someron en Polujo.

„Reĝino de la mineral-akvoj en Polujo“ — estas nomata Krynica, pro sia ĉarma situo, al kiu kondukas la romantika valo de la rivero Poprad. Krynica situas je 560 m. super la marnivelo, en la montaro Karpaty, ĉirkaŭita de belega arbaro kaj per la belegaj montaroj Tatry kaj Pieniny. Krynica posedas multajn sport-aranĝojn, konformajn al internaciaj sportspektakloj. Krynica estas bonega elira punkto, por aranĝi ekskursojn en la altan montaron polan Tatrzy, kien la vojo kondukas apud multaj lokoj kun interesaj vidindaĵoj historiaj. Alia alloga somerbanejo en Polujo estas Szczawnica, kvazaŭ elkreskinĝa el inter rokoj de la montaro Pieniny, distranĉitaj per, ĉiam zumanta kaj ŝaŭmo-plena, rivero Dunajec. Speciale ĉarma kaj emocio-plena estas la remado sur Dunajec, kiam la boato, kondukata de la bravaj montaranoj, preterglitas inter la rokoj, kaj oni pensas, ke jen ĝi frakasiĝas. La valo de Dunajec, diversa en ĉiu loko, prezentas vere agrablan pejzaĝon, kien similan ne multaj landoj posedas. Nun ni trairu al la plej granda somerrestadejo kaj klimat-stacio de Polujo, situanta je alteco de pli ol 1000 m. s. la marnivelo

— **Zakopane**, sub la alta montaro Tatry. Zakopane fariĝis fama turista loko pro ĝiaj multegaj monto-lagoj, inter kiuj la plej pitoreska estas Morskie Oko (Mara Okulo). Se Zakopane estus posedanta nenion pli ol la ĉarmajn ekskursejojn al la montaj lagoj, tio mem sufiĉus por ke ĝi estu vizitinda. Sed en Zakopane ni trovas specialan popolon, kies vivo, moroj kutimoj kaj vestoj vendas ĉe ni tiom da intereso, ke unufoje vidinte, ni ĉiam ĝin rememoras. Tio estas la polaj montaranoj kun ilia folkloro, kun la vestaro, memfarita de memŝpinita blanka ŝtofo, brodita per multkoloraj fadenoj, steletoj, kaj floroj. Por ekkoni la vivon de la polaj montaranoj, valoras veni al Zakopane eĉ de la plej malproksimaj landoj. Ĉiuj nomitaj somerlokoj estas ankaŭ famaj kiel kura-

cejoj. Mineralaj fontoj kaj viviga aero enspirigas en la homon novaĵ kaj freŝaĵ vivo-senton. Iom alian karakteron havas du aliaj somerlokoj en Polujo, situantaj en la sud-orienta parto de nia lando. **Jaremce** situas en bela valo de la rivero Prut, ĉe la **Gorganoj**, preskaŭ sovaĝa montaro, kovrita per malaltaj arbustoj. La saniga monta aero kaj la popolo tie vivanta — **Huculoj**, altiras ĉiam multajn kuraculojn kaj turistojn. La lasta somerloko, kiun mi prezentos nun, estas la situanta en la centro de la pola petrolminejaro — **Truskawiec**, posedanta altvalorajn, sanigajn mineralakvojn. La turistaj valoj de Truskawiec kuŝas ĝuste en ĝia situo, en la centro de la pola petrolminejaro, la fama **Borysław**.

**Henriko Gelb, Warszawa.**

## VENU AL SPAŁA!

### XIII-a TUTMONDA KONGRESO DE SKOLTOJ ESPERANTISTOJ.

Julie 11—24. 1935. okazos en Pollando Nacia Jubilea Jamboreo kaj tutslava tendaro en Spała, kie kunvenos proksimume 30.000 geskoltoj. El multaj landoj alvenos reprezentantoj de skoltasocioj je invito de Pola Skolta Asocio (Z.H.P.). Samtempe estos aranĝita la **XIII-a Internacia Tendaro de skoltoj esperantistoj**.

La tendaro okazos je **oficiala invito** de **Pola Skolta Asocio** sub la alta Protektorato de la Prezidanto de Pola Respubliko **prof. Ign. Mościcki**. En la Honoran Komitaton eniris skoltaj kaj esp. Eminentuloj inter aliaj: **Episkopo dr. Ant. Eltschkner** (Prez. de Ligo de Katol. Esp. Ĉeĥoslovakio), **Pastro J. Font-Giralt** (Prez. de Intern. Katol. Unuiĝo Esp. — kaj red. de „Espero Katolika“ — Hispanujo), **Int. Gen. L. Bastien** (Prez. de U.E.A.) el Francujo) **Dr. W. Perrenoud**, (Prez. de Tutm. Esp. Junulara Asocio — Svislando), **Inĝ. Rollet de L. Isle** (Prez. de Esp. Akademio-Francujo), **Robert Kreuz** (dir. de U.E.A. kaj red. de „Esperanto“ — Svislando), **Prof. Odo Bujwid** (Prez. de P.E.D. — Pollando) k.t.p.

Certe ĉiuj konsentos, ke la okazonta tendaro de skoltoj esp. estas grava okazo por amplekse propaĝandi nian movadon inter la diverslingvaj skoltoj, kunvenontaj en Spała. Ĉe la jamboreo, dank'al nia oficiala rekono de la Pola Skolta Asocio (kiu oficiale invitis S.E.L. por tendari), ni havas la plej bonan ŝancon or propaĝando ĝis nun ricevitan.

La 15-an de julio dek-kelkaj standardoj el diversaj landoj flirtos super la Kongresejo. Tiutage okazos la oficiala inaŭguro de la skolta esperanto-kongreso, kiun partoprenos skoltaj reprezentantoj el dek-kelkaj landoj. Tie oni preparolos la gravajn aferojn koncerne Esperanton por enkonduki ĝin en la tutmonda skoltaro. — Tia okazo ne ofte venas! — Organiza Komitato faras ĉion por ebligi al ne skoltoj (skolt-amikoj) partoprenon en tiu ĉi solena malfermo de la Kongreso. Tiucele la Org. Komitato sukcesis ebligi al la geesperantistaro viziton de Spała 15—16—17 de julio (se iu dezirus eĉ pli longe).

Do, se vi deziras viziti Spała, la lokon de la internacia skolta Tendaro kaj pasigi kelkajn tagojn en frata skolt-esperantista rondo ĉe natur-belecoj de rivero Pilica kaj arbaroj de Spała, tiu havos neforgeseblan impreson por longa tempo.

Se eble tuj sciigu vian deziron — kaj aliĝu al ekskurso al Spała. Ĉiu veturinto ricevos 50% rabaton ĉe fervojo — aĉetante bileton al Spała vi revenveturas senpage. Tranokto en Spała en hotelo, vilaĝ-kabanoj kaj tendoj (kun lito, litaĵo, lavilaro kaj akvo) potaĝe de 1.—1.50 — 2.50 zł. Manĝaĵon vi povas tre facile aĉeti ĉe restoracioj kaj dense dislokitaj kafejoj, kuirejoj (laŭ modera prezaro) en la komerca kvartalo de la jamboreo. Vestoj por gastoj laŭvola.

Pro tio, ke multaj ekskursoj vizitos Spała, estas necese tuj sciigi la Organizan Komitaton pri via partopreno al la ekskurso por rezervi lokon en hotelo, tendoj.

Per via partopreno vi faros grandan propagandon al helpmondlingvo esperanto. Venu do, vi mem kaj venigu ankaŭ aliajn eĉ ne esp. Rondo, societoj povas organizi karavanojn de sia loko. Decidiĝu tuj ĉar tempo jam alvenas! — **Provizora programo:** 15. VII. — 9 h. matene: Preĝo. 10 h. oficiala malfermo de la S.E.L. kongreso, a) salutoj de diversaj nacioj kaj repr., b) raportoj de S.E.L., c) prelego: „Uzo kaj utilo de Esperanto por la tutmonda skoltaro“, c) proponoj pri

uzo de la lingvo kaj laboro de S.E.L. en la skoltaro, — posttagmeze vizito de la S.E.L. Tendaro.

16. VII. Vizito de la jamboreo.

17. VII. Tendara teo en la S.E.L. tendaro por invititaj gastoj kaj skolt-reprezentantoj.

La programo certe alloga venigos multajn esp. al Spała. Nun nur bonvolu senhezite sendi al ni vian aliĝon sur dorso de ĉekpagilo P.K.O. „Juna Esperantisto“ Nr. 413.944. (Samtempe por aliĝkotizo sendu 2.— zł.).

**Bonvenu al Spała!**

Organiza Komitato

Adreso dum la Tendarado:

**Spała — Skolta Esperanto Tendaro.**

## WINCENTY POL.

### *La kanto pri mia lando.*

Wincenty Pol, naskita 1807 en Lublin, mortinta 1872 en Kraków, skribis poeziajn bildojn laŭ maniero popola kaj laŭ baladoj de Mickiewicz. „La kantoj de Januŝ“ iĝis tre popularaj pro sia simpleco, sincera tono, nepretendemo kaj

demokratema tendenco. Plej valora estis forta akordo: „La kanto pri nia lando“ entuziasmiganta por la patra lando ne nur la junar generacion, sed ankaŭ ĉiun plenaĝulon per tre belaj bildoj kaj lingvo. Jen la invokacio kaj fira alvoko.

Jen ĉu scias vi, junulo,  
Kiu via samgentulo?  
Ĉu vi konas Litovanon,  
Samogiton, Rutenanon?

Ĉu vi konas, fratjunulo,  
Teron, akvon de Vistulo?  
Kiel nun ĝi disfamiĝas?  
Maron kiel ĝi eniĝas?

Kaj ĉu konas vi, junulo,  
La riĉaĵon de terbulo?  
Batalkampojn — patrtombaron,  
De pratemp' monumentaron?

Ĉu vi scias, kio vere  
Plenskribita jen surtece?  
Kio koron kvietigos?  
Al ter' kio vin alligos?

Lukti certe venos horo  
Kun si, homoj, vivdoloro.  
Dion texti ne intencu,  
Per bat' baton rekompencu.

Koni lernu jam junaĝe,  
Kien patroj amis saĝe,  
Ĝis ekamos sangherede  
Vian teron vi plenkrede.

Sur la tero, sub ĉielo  
Koni ĉion — granda celo.  
Koni lernu heredaĵon  
Kaj bonfaman la proprajaĵon.

Ĝi plejkore vin karesos,  
Ami certe vin ne ĉesos,  
Sed vin gardos kaj sanktigos  
Kur! kor' via sin kunligos.

Flugu do el via nesto,  
Igos por vi bela festo:  
Surrigardi vian teron  
Kaj heredan bieneron.

...Flugu aglo, flugu  
Super teron dum temp' suna!  
Kur! la pens' kaj kant' elflugu,  
Per la kor' aeron plugu!

Flugu alten bravkuraĝe  
Kaj respiru aernaĝe!  
Ĉirkaŭflugu tutan teron  
Ĉian monton kaj riveron!

Ĉar mistera arbarumo,  
De grenkampoj orkostumo  
Kaj popola revkantado,  
La ĉielo, akvondado:

Unu ludas kankordon,  
Dipotencan mirkonkordon,  
Kanton nesilentigeban,  
Nur al tiu kompreneblan,  
Kies kor' kun ter' kuniĝis,  
Por ĝi morti eĉ pretiĝis...

Wejherowo, en aprilo 1935.

Tradukis: Józef Orzech.



JULIO MIEROSZEWSKI.

## LA ELEKTRA LIRIKO.

(Traduko de l' aŭtoro).

Tiu ĉi malgracia sinjoro, sidanta sur teraso de sia vilao, kiu troviĝas apud la bordo de Geneva lago — nomiĝas Gog. Siatempe li enmanigis al G. Papini grandan faskon de ĉifitaj, plenskribitaj paperoj. Papini — kiel estas ĝenerale sciata — deĉifris tiujn ĉi skribaĵojn kaj eldonis ilin en libro sub titolo: „Gog“.

Verdire Lack estis inĝeniero. De tri jaroj li funkciadis kiel sekretario de Gog post la eksigo de Benrubi.

— Ĉu vi jam ĉion pretigis, Lack — demandis Gog, desegnante ion senkonscie per la pajlereto, per kiu li antaŭ momento gutversadis oranĝaĵon.

— Jes — rediris la inĝeniero. — Ĉio estas preta kaj plenumita.

Gog enpensiĝis, observante per siaj okuloj (unu de ili estis alikolora) du luksajn promensipojn proksimiĝantajn plenele al la bordo. Sur ferdeko de la pli proksima veturis sinjorino Overheim kaj la franca poeto Mailbaux.

— Tiu ĉi tromemfidulo ne antaŭsentas eĉ tion, kio estas esenco de l' poezio — li finis laŭte la penson, ne returnante la kapon.

Lack sciis tre bone, ke temis pri sinjoro Mailbaux.

— Jes! — li klinis jesante la kapon plenkonvinke, sed senhumile. — Mailbaux, kiel ĉiuj al li similaj — estas bona nega metiisto. En sia interno li posedas kelkajn gramojn da poezio, el kiuj li martelas la plej maldikajn ladetojn kun mirinda sperto kaj kun sagaca ekonomio.

— Kiom da gastoj vi atendas hodiaŭ vespere? — interrompis Gog.

— Mi elsendis 50 invitilojn.

— Ĉu vi havas unu de ili ĉe vi?

Lack elpoŝigis longforman karton kun orumitaj randoj kaj donis ĝin al la milionulo.

— Bone. Ĉu la instalaĵoj estas en ordo?

— Hieraŭ mi faris ĝeneralprovon kaj, ŝajnas al mi — kun plena sukceso.

La promensipo, sur kiu veturis sinjorino Overheim kaj la franca poeto Mailbaux, estis ĝuste ankrumita ĉe la moleo.

Nigra kiel antracito, pordisto Stamp post ekbato de 8 horo brufermis la pordigon, kondukantan al la ĝardenoj de Gog. Tian ordonon li ricevis hodiaŭ ma-

tene. Tridek du aŭtomobiloj, kiuj traveturis mallaŭte antaŭ liaj rondaj okuloj, estis nun ordigataj en rekta vico apud la norda muro. La unua nigra veturilo estis posedaĵo de sinjorino Overheim.

La grandan salonon lumigis kvar vitraj globoj, pendantaj en ĉiu angulo. Lakeoj en pompaj uniformoj lokadis alvenintajn gastojn laŭ numeroj de l' invitiloj. Parolmurmuro ŝvebis en aero kiel nubo de moskitoj. Nur Gog, starante post la pordokurteno, meditis silente pri la malperfekteco de l' parolo.

— Ĉiuj jam ĉeestas! — flustris Lack.

— Kiel fidas Verkoli? — demandis la milionulo.

— Li atendas en mia kabinejo kun rigardo fiksita en la foto de Karlota.

Gog rigardis sian poŝhorloĝon.

— Bone, ni komencu!!

Potenciĝanta ĝemo de l' sonorilego ek-sufokis subite la parolbruon de la salono. La sonaj ondoj kreis vibrantan serpenton, kiu interspacigis en la malhela ejo de l' salono.

Ruĝaj inaj lipoj ek'remis kiel floraj petaloj sub la spiro de alvenanta ventego.

— Sufiĉe! — flustris Gog al inĝeniero.

Lack faris mallongan manmovon kaj en salono ekstaris morta silento. La mallumo kunkuriĝis en unu punkton kiel kunŝovita de nevidebla peniko. La anguloj komencis griziĝi.

— Mi volas diri al vi — eksonis de la estrado la malalta voĉo de Gog — kiel longa estas la vojo de fenomeno al parolo. Nia parolmaniero baziĝas sur konvenanco kaj ŝablono. Kiam mi diras: ruĝa — ĉu mi scias, ke mi estas komprenita? Certan koloron oni devigis min nomi per tiu ĉi vorto, sed ĉu iu ne vidas ĝin alie, tion mi ne scias. Tiu ĉi fenomeno kaŭzis, ke la paroloj — kiuj en origina senco estis nur sonaj simboloj de l' aĵoj — ekestiĝis memstaraj estaĵoj. Inter ni kaj la mondo elkreskis murego de la paroloj, kiuj ribelis kontraŭ ni kaj ne volas plu esti sklava alfabeto, servanta por eldirado de homaj pensoj. Hodiaŭan vesperon ni dediĉas al nova senparola poezio. Mi ceriĝas, ke ĝi nek entenas falson, eternan ombroon de parolo, nek fatalecon de mensoĝo.

Ĉe la lastaj vortoj de Gog eklumiĝis malrapide cinobra lampo. La krepusko de l' salono soife ensorbas sukecan lumon.

Surestrade aperis gracia juna viro kun albruste klinita kapo.

— Jen staras antaŭ vi Lorenzo Verkoli! — ekparolis Gog refoje. Hieraŭ vi certe ĉiuj legis en gazetaro pri la tragika akcidento, kiu forprenis de vivo lian fianĉinon, la faman violinistinon. Ŝi eksilentiĝis kiel akordo mallaŭtigita de Dio.

Lorenzo Verkoli jetis mallongan rigardon sur Gog — sidiĝis kaj kaŝis sian vizaĝon en manplatoj.

En la plej mallaŭtaj pianisimoj naskiĝadis violona sonato. La aero satiĝis per melodio kaj malfermiĝis kiel akustika navo de gotika preĝejo sub riĉeco de l' tonaro.

— Karlo! — eksonis dolora krio.

Tra la rigardejo trakirus maskita tremo. Ruĝaj inaj lipoj ekvibris nerve — sinjoroj kuntiris brovojn.

— Karlota!

Lorenzo Verkoli ploris. La violona sonato fluis romantika kaj dolĉa. Gog, kaŝita en pordokurteno, donis mansignon al la inĝeniero staranta post li. La cinobra lampo po iom estingiĝis. Sur estrado sub la klinita kapo de l' ploranta Verkoli eklumiĝis vico de fosforumantaj punktoj. Perle longigitaj larmoj de la italo gutadis tra liaj delikataj fingroj. En krepuska mallumo disfluiĝis la estrado, la silueto kaj la kapo de Verkoli — kaj en mallarĝa vidkampo ekpendadis fantome la preskaŭ vivinaj manoj. La fosfora lumekbrilo dum sekundero akcentigis ĉiun larmon aparte per fajreta reflektio. Muta simfonio de larmoj fluadis malgaje tra fingro-kordoj.

De malsupre komencis leviĝi arke purpura brulruĝo. Ĝi kreskis, potenciĝis kaj tuŝis vizaĝon de ploranta Lorenzo. Per laj larmoj rompis purpuran lumtrenton kaj per multobleco de siaj prismoj disfaliĝis en pluvego de kolorfantomaj vibraĵoj. Ĉiu larmo kreskis flame kaj estingiĝis karminarde. Doloraj perloj post

## EL KANTOJ DE L' SOLECO.

### „LA VIVO KOMENCIĜOS MORGAŬ!“..

Antaŭ multaj jaroj mi legis la libron. Paliĝis jam delonge la enhavo kaj la herooj foriĝis ien en la malproksimon. Nur la titolo malgraŭvole engravuriĝis en la memoron:

mortinta amo reviviĝis en optika poezio kreante amalgamon de nekonataj koloroj.

La violona sonato mallaŭtĝadis romantika kaj dolĉa.

— Karlota!

Jam dum la oka minuto gutfaladis varmaj larmoj tra la krucumitaj fingroj de Lorenzo Verkoli. Aro da elektraj lampoj kaj reflektoroj, enmuntita sub vitra tabloplato, aliformigis ilin en miriga kolorplena belo. Li mem, tragika efebo, ne ekzistis plu — ĉirkaŭvolvita de densa krepusko. Nur liaj larmoj poeziis.

Mailbaux febrigiĝis pro kolero. Jen li, gravulo — famega poeto, staranta jam tiel proksime de mola seĝo en la akademio de la „senmortuloj“ — partoprenis en la malsaĝa afero. Morgaŭ en priskriboj de tiu ĉi arlekena komedio tralegos centmiloj da liaj legantoj nomon, kiu estas vojmontrilo por multaj: Louis Mailbaux!

En deka minuto lumiĝis malrapide la cinobra lampo. Sur la estrado eksiluetis la malgracia torso de Gog.

— Sinjoro Mailbaux! — kial vi ne ekkriis, ke Lorenzo Verkoli mensogas? Mi certigas vin, ke liaj larmoj estis malpli mendeblaj ol viaj poeziaĵoj. Alvenos renesanco de liriko kaj revizio de parolo. Kiu de vi ne memoras mutan filmon ilustritan de muziko? Ĉu vi ne rimarkis, ke ekzistas momentoj, en kiuj optikaj travivaĵoj asociiĝas plej ekzakte kun melodio? Parencoco de koloro kaj tono — kombinebleco inter melodio kaj okulaj impresoj entenas neatedatajn potencojn. Multaj komprenus pli ĝisfunde 9-an simfonion, se ili kreus por ĝi konforman kolorakordon. Ni altkreskadis per parolo — en kuniĝo de tono, koloro kaj parolo ni trovos sintezon de l' arto.

Mailbaux ne aŭskultis eĉ unu vorton el la parolado de Gog. Antaŭ eklumiĝo de la cinobra lampo li forlasis la salnon de l' milionulo. Postan tagon inĝeniero Lack enmaniĝis al la iom ĝenita Lorenzo Verkoli ĉekon por 5000 frankoj — ĉar certaj flankoj de l' vivo restos por ĉiam egalaj.

„La vivo komenciĝos morgaŭ!“.

Estante ankaŭ infano kaj gaje amuziĝante per ludiloj, mi ofte aŭdis de plenaĝuloj envie:

„Via vivo komenciĝos morgaŭ!“.

La jaroj pasis kaj junulo ŝanĝis la infanon. Estis amo, sopiro, man' en la mano... Kaj kiel multpromese, konvinke flustris la malnovaj arboj en la parko:  
„La vivo komenciĝos morgaŭ!“

Sed foriris senrevne la printempo de l' vivo. La tagoj freneze postkuras unu la alian. Ĉiam pli premadas la zorgoj kaj grizeco de l' ĉiutaga batalado. Sed esperige sonis ankoraŭ:

„Via vivo komenciĝos morgaŭ!“

Kaj jam la arĝenta prujno kovris la

tempiojn. La koro batas pli malrapide kaj vane ĝi revus pri ĝojo... feliĉo... Nur ironie ŝajnas soni la enĉiziĝintaj vortoj:

„La vivo certe komenciĝos morgaŭ!“

Sed foje venas la momento, kiam levigas alten la kapo, rektiĝas la dorso, pugne kunmetiĝas la manoj, pli arde ekbrilas la okuloj... Tiam digne kaj laŭte mi jetas al la tuta mondo:

„Mi protestas! Mi volas, ke la vivo komenciĝu jam nun!“

J. Dratwer.

## KOLEGIO DE INTERNACIAJ PRELEGOJ AKADEMAJ JE LA NOMO DE L' UNUA MARSALO DE POLUJO — JÓZEF PIŁSUDSKI EN GDYNIA

— sub egido de la Komisiono de Internacia Kunlaboro de Profesoroj kaj Docentoj de Juro Administracia kaj Politikaj Sciencoj. — La IV. jaro de ekzisto de la Kolegio. La prelegoj okazos en Gdynia, la 14. VIII. 1935.

Honora Rektoro de la Kolegio, prof. Wiktor Cadere, Rumana Ministro en Warszawa, Rektoro, prof. Dr. Tadeusz Hilarowicz. Programo de l' prelegoj: **I. Instituto por Sciencoj Administraciaj kaj Ekonomiaj**, prezidanto, prof. Dr. T. Hilarowicz. La prelegoj: Problemoj komunumaj, de la plej gravaj ŝtatoj en Eŭropo, — Internacia varŝanĝo, problemoj valutaj, internacia interkompreniĝo ekonomia, karteloj, la batalo kontraŭ krizo, la nova pola konstitucio, la jura kulturo de iama Polujo kompare kun aliaj ŝtatoj slavaj, geografio komunikada, Gdynia, Danzig, eksporto kaj importoj, konvencioj internaciaj turistaj, kompensado per turist-interŝanĝo kaj multaj aliaj. **II. Instituto pri Kulturo de Slavaj Popoloj**. Jen la plej gravaj prelegoj de tiu Instituto:

Geografio, popolo, historio kaj kulturo de Jugoslavio, etnografio de la Slavoj, de Pomeanio kaj de Ĉeĥoslovakio, literaturoj pola kaj ukraina, literaturo rutena, ĉeĥa, bulgara; la popola arto en Polujo, la pola pentroarto kaj gravuraĵo, monografiaj prelegoj de la pola literaturo, la restarigo de Pola Respubliko, monografiaj prelegoj pri Marŝalo Józef Piłsudski, — kaj multaj aliaj tre interesaj prelegoj.

La prelegojn faros: profesoroj de universitatoj polaj kaj de aliaj ŝtatoj, kaj ankaŭ eminentuloj kiel ministroj k. s. de kelkaj koncernaj landoj. Jen kelkaj nomoj de prelegantoj: Prof. H. Gliwic, Ministro I. Matuszewski, Dr. R. Górecki,

Prof. T. Hilarowicz, prof. J. Łazowski, prof. Wł. Namysłowski (Polujo), Prof. W. Cadere (Rumanio), Prof. G. Bassani (Belgrado), prof. A. Jovanowicz (Bratislava) kaj aliaj. Kondiĉoj: Aliĝo al ĉiu Instituto 20 zl. polajn, — al ambaŭ kune 30 zlotojn. La aliĝintoj povas ricevi loĝejon kun tuttaga manĝo por 5 zl. tage. La partoprenantoj en la Kolegio ricevas fervojrabaton.

Aliĝojn oni sendu je la nomo de la Instituto-Direktoro, prof. Dr. T. Hilarowicz, Warszawa, Łowicka 51/43. Informojn petu de la Sekretariejo de la Instituto: Warszawa, Wspólna 54/3.

Henryk Giełb.

### ERNI HIIR.

*Ne kreskas la spirit' rapide.*

Ne kreskas la spirit' rapide,  
matura pens' ĝermigas ĝin,  
per freŝ' printempa ĝi senbride  
radios en plej brila rim'.

Ho donu pacon kaj trankvilon,  
amaron de soleca sent',  
ke ĝuu la spirit' ekspiron,  
liberan de ŝlimeca tent'.

La tempo rompos mem la digojn  
inundos per batalo-bru'  
la valojn, donos mem instigon  
al nova kaj senbara ĝu'.

Kelkiam la spirit' malŝpara  
retiras kvazaŭ drone sin,  
kaj tiam post solec' amara  
mirigos per burĝonoj vin.

Kondamnu disreviĝ', sufero  
spiriton al dolora sol',  
ĝi estos baz. por nova vero,  
naskiĝos ĝoj' de kordolor'!

El la estona: Hilda Dresen.

## SINCERAJ KONFESIOJ DE L' REDAKTANTO.

Jam kelkfoje ni intencis skribi kelkajn liniojn por la versemaj samideanoj, tamem ni tion ĉiam prokrastis. Feliĉe iu sennomulo sendis al ni la ĉisuban felietonon kun la titolo: „Kion mi farus, se mi estus redaktanto de *Esp-gazeto*?” Ni tre kore dankas lin. Eble la felietono dekutimigos la sentalentajn „poetojn” verki la talentplenajn „poemojn”. Eĉ nur kelkmonata paŭzo estus tre salutinda. Cetero bonajn poeziaĵojn ni akceptas ĉiam.

### La Redakcio.

Por redaktanto de ĉiu *Esp.-revuo* estas konate, ke inter la ricevata materialo plej multe oni ricevas da „poeziaĵoj”. Plej ofte - pli multe ol necese. Aŭtoroj de „poeziaĵoj” estas ĉiam, sed mankas aliaj legantoj krom la aŭtoro mem kaj poste la redaktoro (mi povus diri redaktanto, sed ankaŭ mi estas „poeto”).

Oni devas esti eltenema por ne ek-suferi je kapdoloro aŭ ne mortigi iun post iaj poemoj, kiujn finleginte, oni furiozas pro la terurega gramatiko, manko de senco ktp.

Jen niaj petoj, konsiloj, instruoj...

Rimaĵojn, je Dio, ne faru, ĉar ni ŝatas poeziaĵojn. Kiam vi eksentis poetan inspiron, unue prenu malvarman banon aŭ duŝon kaj poste se, malgraŭ ĝi, vi povos diri pri vi, ke poetan „fajron sentas mi interne” — rimu, tamen memoru „ke vivi ankaŭ mi deziras”. Sciu antaŭe almenaŭ 16 regulojn de la *E.-gramatiko*. Ne domaĝus, se vi konus ankaŭ poetikon, ritmikon, retorikon, estetikon. Esploru, ĉu centoj da aliuloj ne jam esprimis vian ideon pli forte kaj pli bele. Ne opiniu, ke mi, la redaktanto, estas tute sentalenta „poeto”. Ankaŭ mi komencis poetadi, antaŭ ol mi sciis la gramatikon kaj vortaron. Mi memoras, ke mi ekpoetis post unu duontaga okupigo pri *Esp.* Certe vi konas tiun parafrazan fragmenton el la opero „Halka”:

„Szumią sosny na wysokiej górcie,  
szumią gdzieś bardzo daleko,  
a młodemu człowiekowi jest bardzo  
nieprzyjemnie,  
gdy ma w sercu niedyspozycję”...

Kaj mi tion tradukis:

Bruas pinoj sur montsupro,  
bruas kune for,  
sed malgaja juna vivo,  
se doloras kor’.

Mi sukcesis tion finkombini „jam” post unutaga cerbumado. La erarojn en la poemo mi ne plu memoras, eble ili ne enestis. Kelkajn monatojn poste mi eksciis, ke tion jam faris mia „kolego”, „ankaŭ” poeto, Grabowski. Do li antaŭkuris min kaj mia verkado estis vana.

Jes, jes, la traduko el Halka estis ĝenia, sed mi ŝatis poeziojn fortajn. Mi prenis la vortaron kaj serĉis la vortojn, kiuj havus bonajn rimojn. Je mia miro mi vidis multajn vortojn kun oro-finaĵoj. Mi notis iomon da ili, poste mi ordigis ilin iel por ke ili povu havi kune ian sencon. Poste mi, kiel „poeto” vidis, ke estas necese enkonduki novan vorton por trovi rimon kaj havi sencon (licentia poetica). Feliĉe estis en vulgara pola lingvo juddevena vorto (bahoro ĉi tie — infano) taŭga por miaj celoj kaj jen ekestis mia poemo:

### La rompita idilio...

Direktoro  
el kontoro  
al foro...  
li kun ŝi...  
floro, floro, floro (=estis multaj)  
koloro, koloro, koloro (=estis multaj)  
odoro...  
li — aktoro,  
oratoro  
pri amoro...  
malfrua horo...  
likvoro...  
vi — oro,  
trezoro...  
ĝis aŭroro...

Ĉi tie mi haltis. La tempo pasadis kaj post ne plena unu jaro mi povis laŭ la trovitaj siatempe oro-rimoj aktuale finkombini la „poemon”.

....bahoro.

Ploro,  
doloro  
pro ignoro...  
rompita koro...

Jen fifervoro!!...

Restis al mi ankoraŭ kelkaj oro-vortoj, sed mi ne uzis ilin por ne trolongigi la „poemon”. Por memoro (jen vidu: ankaŭ ĉi tiu vorto estis aplikebla) mi ilin notas: stertoro, vapore, fetoro. Mi ne plu bezonis, ilin, ĉar mi rompis mian poetan plumon por ĉiam... kion ankaŭ mi deziras al vi, se vi ne posedas veran talenton.

# NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

**KOMERCAJ ĈAMBROJ KAJ ESPERANTO.** Kiel montras la statistiko, 23 foiroj, 156 ĉambroj de komerco kaj 43 ĉambroj mikstaj voĉdonis dum la tempo 1922—1935 favore al Esperanto.

**UNIVERSALA KONGRESO EN ROMA** estos verŝajne unu el la plej brilaj. Ĝis nun jam aliĝis pli ol 1000 kongresanoj.

**RADIO ROMA** dissendas regule ĉiun lundon kaj merkredon je 18'30—18'40 informojn pri Universala Kongreso.

**RADIOJOURNAL MORAVSKA O-STRAVA** promesis disaŭdigi esp. programon ĉiusemajne. Sed estas bezonaj multaj leteroj petantaj pri tio.

**„NI RIGARDAS TRANS LA LIMON“** jen la titolo de konstanta rubriko en ĉiusemajna ilustrita gazeto „Wij“ (Ni) en Nederlando, eldonata en 100.000 ekzempleroj. La teksto ĉe la bildoj estas en nederlanda kaj esp. lingvoj.

**TRA NEDERLANDO PER OKTAGAJ ABONKARTOJ.** Nederlandaj Fervojoj eldonis belegan prospekton en Esp. pri oktagaj abonkarto sur fervojoj, permesantaj en malmultekosta maniero viziti tiun „landon de Rembrandt“. Ŝokas uzita sur la unua paĝo la gramatika formo: „vojaĝuntoj“. La prospekton sendas senpage Ned. Fervojaro, Sekcio de Publikado, Utrecht.

**UNIVERSALA BRUKSELA EKSPozICIO 1935** eldonis kvarpaĝan prospekton kun detala plano de la ekspozicio.

**STUDOJ PRI FERVOJAJ AFEROJ.** Japana Esp. Ligo Fervojista post la publikigita en 1932 „organizo de Japana Statfervojoj“ publikigis nun 14 paĝan studon pri instalado de stangeframita fertrabo per ŝipo.

**KOMIZA GAZETO** 4-paĝa internacia fakogazeto por tutmonda komerca popolo. Adr.: Fako 34, Gunnarstorp, Svedujo.

**STACIDOMAJ TABULOJ.** Ni jam informis pri tiu bonega reklamilo de ĉeĥoslovakaj samideanoj. La aranĝo de tabuloj okazas laŭ permeso de la ministerio. Ĝis nun jam pli ol 60 stacidomoj enhavas tiajn tabulojn.

**OFICIALA HONORIGO AL LA DIREKTORO DE UEA.**

Lia Moŝto, Francisko I-a, la Reganta Princo de Lihtenstejno, ĵus nomis Sron,

Rob. Kreuz, Direktoron de UEA., en Genevo, „Princa Komerca Konsilisto“, konsiderante liajn meritojn pri la fremdul-trafiko en tiu ĉi princlando. De pluraj jaroj la Direktoro de UEA okupiĝas pri la turisma propagando, de Lihtenstejno pere de Esperato. Li ankaŭ reprezentis la Registaron kiel Speciala kongresoj neesperantistaj. Al lia iniciatkomisaro en niaj universalaj kaj aliaj to estas ŝuldataj la ĝis nun aperintaj serioj de oficialaj poŝtkartoj en Esperanto kaj pluraj prospektoj pri la lando. Pro tio, tiu ĉi gratulinda honorigo estas samtempe rekono por la Esperanto-movado kaj pri la efikeco de Esperanto mem kiel moderna helpilo por la turismo. Ĝi estas krome indikilo, laŭ kiu direkto ni devas orientadi nian praktikan laboron.

**ESPERANTO-EKSPozICIO EN ŜANGHAJO** okazos en OKTOBRO. Oni dankeme akceptos ĉiujn materialojn sendatajn de fervoraj gesanoj el ĉiu lando. **ADRESO:** La Ekspozicia Komitato de S. E. L., No: 14, Lane 169, Carter Road, Ŝanghai, Ĉinio.

T. A. G. E.

Kiam ĉiuj geinstruistoj-esperantistaj sin organizus en la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj, ni certe havus konsiderindan influon ĉe aŭtoritatoj, internaciaj fakkongresoj kaj landaj organizoj. Vi helpu akceli la enkondukon de Esp. en la lernejo.

Jarkotizo estas 2.50 ned. guld. (5 sv. fr.) Vi ricevos la organon: Internacia Pedagogia Revuo, kiu jam aperas dum 14 jaroj kaj informas pri pedagogiaj kaj lernejoj el diversaj landoj. Ĝi peradas pere de siaj korespondlistoj la kontakton inter multaj gekolegoj kaj gelerntoj.

Adreso: P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam (Nederlando). Poŝtekkonto 90544 Hago.

## POR KURSGVIDANTOJ!

Bonege konservitan, kompletan, antikvecan kursmaterialon laŭ Ĉe-metodo, bezonegan por kursgvidantoj havigu al vi ĉe „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. Prezo zł. 18.— kun afranko.





**KRAKÓW.** Dank' al iniciativo de Esperantaj Societoj en Venezia kaj Napoli aranĝis la Literatur-Artista Komitato de Polaj Esperantaj Societoj kune kun Societo „Dante Alighieri” en Lwów, sub gvido de nia vigla kaj fervora laboranto sur kulturkleriga kampo s-ro Henryk Schnützer, italan vesperon „Venezia e Napoli” la 22 de junio k. j. okaze de XXVII. Internacia Kongreso en Italujo.

La granda, bele kaj riĉe renovigita koncert-salonego „Sala Saska” estis dekoraciita per itala, pola kaj esperanta flagoj:

Malfermis la vesperon nia konata kaj ŝatata prof. Dro Bujwid. Poste parolis vigle kaj interese pastro Dro Tadeusz Pomian-Kruszyński pri Venezia kaj Napoli. La koncerta parto konsistis el kantoj, recitaĵoj kaj dancoj. Bone konata kantistino s-ino Ema Bolońska kantis konatajn italajn melodiojn, itale kaj esperantlingve. Ludis bonega mandolinista orkestro „Espana” kaj s-ro Czesław Kozak, juna kantisto, dank' al lia bela voĉo estis multe aplaŭdata. S-ino Reszczyńska deklamis siajn recitaĵojn pri Venezia. Fine majstre dancis italajn popoldancojn, en itala kostumo, nia ĉarma, 9-jara dancistino, Ewunia Kołogórska, laŭreatino de la danckonkursoj en Varsovio kaj Vieno.

La bela „Giovinezza” ludata de mandolinistoj kaj itala himno, kiun la ĉeestantoj aŭskultis starante, finis la belan, impresplenan vesperon. Ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj. N. B.

**TARNOBRZEG.** La 16-an de junio okazis en salono de ĉi-tiea Ŝtata Gimnazio esperanta ekspozicio, kiel la finiĝo de la esperanta kurso gvidita de la fervora s-ano Jozefo Toczyski. Dank' al lia klopodo la sukceso de la ekspozicio estis granda. Pli ol 150 personoj vizitis ĝin, aŭskultante kun granda intereso la klarigojn pri signifo kaj progreso de Esperanto kaj pri ĝia utileco. Multaj inteligentuloj kaj mezlernejaj studentoj aliĝis jam al sekvonta esperanta kurso, kiu okazos aŭtune.

**WARSAWA.** La 28. IV. 1935, dimanĉe, okazis „Memorvespero pri Felikso kaj Leono Zamenhofoj”, kiuj tiel neatendite forlasis nin antaŭ nelonga tempo, postlasante grandan doloron inter esperantistaro. — En bela ejo de Kuracista

Asocio, dispenigita por esperantistoj, aliĝis familio Zamenhof kaj gesamideanaro, por honori la memoron de la du karaj samideanoj, fratoj Felikso kaj Leono. Malfermis la Vesperon eminenta poeto Leo Belmont, kiu en belaj vortoj skizis la vivon kaj karakteron de la Mortintoj. La ĉeestintaro aŭskultis tre atente lian brilan paroladon, kiu postlasis neforgeseblan impreson. Poste parolis interese s-anoj J. Forge, I. Lejzerowicz kaj E. Wiesenfeld. Kortuŝa estis la momento, kiam blinda samideanino, Zofja Osidacz, alproksimiĝis al la tablo por deklami poemon de Felikso Zamenhof s. t. „Al blindulo”. Kun granda emocio dankis ŝin Leo Belmont, kortuŝe aplaŭdis ŝin la publiko. Vera ornamo de la Vespero estis ĉarma f-ino Alina Czerwińska, kiu tre bele deklamis poemojn de Felikso kaj Leono Zamenhofoj. La Vespero finiĝis per „La Espero” pianludita de s-ano B. Łodygowski.

**WILNO.** La 14-an de aprilo la Turista Esperantista Rondo ĉe Ž.T.K. („TERO”) en Wilno aranĝis funebran akademion, honore al nia Majstro, Dro Zamenhof. Dro Gurviĉ prelegis pri la vivo de Dro Zamenhof kaj lia verko; V. prezidanto S. Ŝik prelegis pri la lastaj tagoj de Dro Zamenhof; S-ano Subotnik deklamis versaĵojn dediĉitajn al nia Majstro.

Okaze de la apero de **Enciklopedio de Esperanto** kaj honore al nia gastoj D-ro Perelman (Delegito de U.E.A. en Łomża) „TERO” ĉe Ž.T.K. en Wilno aranĝis la 10-an de junio „Glason da teo”, kiun ĉeestis pli ol 100 personoj. Post la honorigo de la memoro de Dro Zamenhof kaj Marŝalo J. Piłsudski (per 3 minuta silento) prezid. Dro Gurviĉ salutis la gastojn D-ron Perelman kaj prelegis pri la mortinta mondfama S-ano Louis de Beaufront. Poste Dro Perelman rakontis pri siaj diversaj interesaj Esper. travivaĵoj. S-ano S. Ŝik prelegis detale pri la historio, signifo, valoro kaj kunlaborantoj de la grandega grava esp. epopeo, pri la Enciklopedio de Esperanto. Parolis ankaŭ S-ano Subotnik. La ĉeestantaro „ĉerpis novan forton” per bongustoj Esp. sukeraĵoj preparitaj de niaj fervoraj kaj simpatiaj s-aninoj f-inoj Kac kaj Wiedekka. Post la fino de la „oficiala parto” la gesamideanoj „elegante eklevis la piedon” sub la akompano de la Esp.-tango.



## RECENZOJ.



**NOVA BIOGRAFIO PRI ZAMENHOF.** La 2-a n-ro de HUNGARA HEROLDO (Mezeŭropa Revuo) aperis sur kvindek du paĝoj. Ĝi enhavas la novan biografion de L. L. Zamenhof, pretigitan ĉefe laŭ lia ĝis nun nepublikigita longa letero al A. Michaux; multaj interesaj novaĵoj. Alia artikolo detala konatigas la literaturan agadon de Zamenhof. La aŭtoro de ambaŭ artikoloj estas G. Waringhien. La teksto estas represo (kune kun la tuta litero Z) el la ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO, jam finredaktita. Aliaj pli gravaj artikoloj de la tute en Esperanto redaktita revuo: Konfeso de A. Forel, Polaj-hungaraj rilatoj, La stenografio en Hungarujo, Informoj pri la hungara kulturo, ekonomio kaj turismo, 3-paĝa virina rubriko, kritikaj notoj pri la Esperanto-movado, literaturo ktp. La revuon redaktas L. Kókény, la redaktoro de la Enciklopedio. Jara abono: tri svisaj frankoj. La 2-a n-ro estas ricevebla por tri respondkuponoj. Adreso: Budapest X., Pongrác-ut 17. F.—6.—3.

**BENITO MUSSOLINI: VIVO DE ARNALDO.** La esperanto-Eldono de tiu ĉi libro aperas post la propono de s-ro Ugo Vinicio Pacini, per la financaj rimedoj de s-ro Gino Catarzi, per la afabla interveno de la Esperanto - Centro Itala ĉe la posedanto de eldonrajtoj IL POPOLO D' ITALIA.

Eldonis: **Literatura Mondo, Budapest.**

La detaloj de la libro: Formato: 20x13½ cm. 106 paĝoj kun kliŝita manuskripto de la testamento de A. Mussolini. Ilustrita kovrilo.

Prezo: Broŝurita svfr. 1.80, bindita 3.30, sur luksa papero: broŝurita 2 20, tole bindita 4.—.

Arnaldo estis frato de Benito Mussolini. La granda frato starigis al Arnaldo siaspecan monumenton per tiu ĉi libro. Arnaldo estis ĉefredaktoro de grava faŝista ĵurnalo, „Il popolo di Italia”, kies fondinto estas Benito. La aŭtoro unue prezentas vivkuron de Arnaldo, poste karakterizas lin kiel ĵurnaliston kaj verkiston, kiel kunlaboranton, fine kiel fraton kaj homon. Sur lastaj paĝoj troviĝas la testamento de Arnaldo kaj adiaŭo.

La enhavo de la libro estas interesa, sed mi dezirus vidi kelkloke apartajn klarigojn de l' tradukinto, ĉar la priskribitaj okazaĵoj certe estas tute kompre-

neblaj por italoj en originalo, sed iom malklaraj por iu, kiu ne speciale interesiĝis pri la historio de faŝista movado. La traduko estas bonega, troviĝas esprimoj tre trafaj kaj kolorriĉaj. Sed kion signifas: „La faŝismo alfrontis ĉiujn batalojn?” pĝ. 37, orgojla? Kial kelkfoje preso anst. gazetaro? Revelacio ĵurnalistika? (48). Tre bona estas (cetere jam antaŭe vidita): liberigita disde la obstakloj. Ree: vi sentos vin pli preparitaj por alfronti la tempeston. (61 pĝ.) (?). ĵurnalista laboro estas tro rapida, por ke oni povus fari ĉiutage majstroverkon (pĝ. 62). Memorinda estas la esprimo: **nomumi** — mianować, **enfermiĝema** — zamknięty w sobie, **nomumo** — nominacja, **Ministrio de Internaj Aferoj.** (72). Na podstawie — baze de (72). Kohereco (?) 72. Enkondukinda estas **inkompatebleco** — latine incompatibilitas. Trafa maksimumo: „La animo de l' popolo respektas la farton, sed amas bonecon. (90). Sukplena esprimo: sugestio, kiu **fontas** (— bije) el tiu ĉi dokumento (91).

**AUGUST STRINDBERG: PASKO.** Dramo en tri aktoj. El la sveda tradukis Stellan Engholm. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, 88 paĝ. Prezo: sved. kr. 1:50.

Dum la 26a universala esperantokongreso en Stockholm teatra trupo sub gvidado de reĝisoro Sandro Malmqvist ludis unuaktan dramon: Ludi kun fajro, de August Strindberg, la plej granda sveda verkisto. La prezentado estis multe laŭdata ne nur de la esperantistoj, sed ankaŭ de la profesiaj kritikistoj de la grandaj stockholmaj ĵurnaloj, kiuj estas tre severaj en siaj prijuĝoj.

Nun s-ro Malmqvist ĵus entreprenis vojaĝon tra la baltaj landoj prezentante, krom la dramon jam menciita, la triaktan dramon Pasko de la sama aŭtoro. La geaktoroj rikoltis grandan laŭdon. La tradukon faris s-ro Stellan Engholm, kies nomo estas tre bone konata tra la mondo tiel pro lia majstra traduko de la grandega verko Gösta Berling kiel ankaŭ pro liaj originalaj verkoj, el kiuj la debutromano Al Toronto jam aperis en dua eldono. Pasko estas unu el la plej konataj kaj ŝatataj dramoj de Strindberg, multfoje prezentita en Svedujo kaj ankaŭ en aliaj landoj.

La libro prezentiĝas en bela eksteraĵo kaj preso.

## LA BATALO KONTRAŬ KRIMO.

La krimo estas aperaĵo konata en la tuta mondo, ĉie ĝi estas kaŭzata de la samaj kialoj, tamen ne ĉiu lando batalas kontraŭ ĝi per la samaj rimedoj kaj metodoj. Al fakuloj, miaj profesoroj mi promesis prilabori tiun problemon, helpe de Esperanto. La taŭga materialo estos publikigota en tre grava scienca revuo kriminologia. Tial do mi turnas min al vi kun varmega peto;

Fakuloj ĉiulandaj, sendu materialon aŭ artikolojn proksimume laŭ jenaj temoj:

1) Kiel via lando batalas kontraŭ krimo?

2) Kiel via lando batalas kontraŭ krimo de junuloj (malaĝuloj)?

3) La organizacio de la malliberejoj en via lando (kia sistemo, ĉela, progresiva k.t.p.).

4) La organizacio de iu plibonig-domo por junulaj krimuloj en via lando (Al la temoj 3 kaj 4, se eble aldonu fotojn, montrantajn la novtempajn, modernajn aranĝojn pri laboro, eduko, higieno, k.t.p.)

5) La historio de la malliberejo kaj ĝia evoluo en via lando.

6) Kiel oni protektas la malliberulon,

liberigitan el la malliberejo, kiel kaj kiu helpas al li sin aranĝi, ricevi laboron k.t.p., ke li ne estu devigita fariĝi recidivisto (tio signifas: ĉu en via lando ekzistas tiaj societoj kiel ekzemple en Belgujo „Service Sociale“ aŭ en Ameriko „Probation Officers“, kiel ili laboras, ĉu ili estas ŝtataj aŭ privataj, ĉu ili vere multe faras por la „resocianigo“ de la krimuloj, kiel ili atingas siajn rezultojn).

Kaj ĉiuj aliaj temoj koncernantaj kriminologion aŭ malliberejan leĝaron. („Droit penitentiaire“).

La materialoj plej prefere en Esperanto, tamen povas esti en aliaj lingvoj, se la preparo en la Esperanta estas al vi iom malfacila. Samideanoj fakuloj, subtenu tiun aranĝon, kiu faros des pli bonan propagandon por Esp., ju pli multaj landoj, kaj speciale la ekzotikaj, alsendos materialon.

Tutkore antaŭdankas al ĉiuj sendontoj — Henriko Gelb, Warszawa. La materialon bonvolu direkti je adreso:

Henriko Gelb, Warszawa, Marjańska 10/14, Pollando.

### PRUNTO KAJ KREDITO.

Verkisto Rimaĉul kaj lia kolego Plagiatul sidas kune.

„Ĉu okupita?“ demandas Rimaĉul.

„Sufiĉe“.

„Kion vi nun estas verkanta?“ plu demandas Rimaĉul.

„Mi verkas miajn rememoraĵojn“.

„Ĉu baldaŭ vi atingos la jaron 1929?“ informiĝis Rimaĉul.

„Kial 1929?“

„Nu, tiam mi pruntedonis al vi 100 frankojn, kiujn vi ĝis nun ne redonis al mi“.

(W).

Kun terura malbonhumoro Alfredo renkontas Karlon sur la strato kaj diras: „Mi petis nian amikon Alberton, ke li pruntedonu al mi cent lirojn, sed

li rifuzis. Li estas abomeninda, stulta, malhonesta...“

„Atendu“, interrompas Karlo, „ne finparolu: ankaŭ mi fariĝos malhonesta!“

(Jakoizako).

— Kial vi ne farigas al vi novan veston?

— Tial ke unu tajloro diris ke li ne faros, ĉar li ne konas min, kaj la alia tajloro diris, ke li ne faros, ĉar li tro bone konas min.

(L. R.)

**ĈU VI JAM FINPAGIS LA ABONON POR J. 1934?!**

**SE NE**

**PAGU TUJ JE NIA KONTO**

**P. K. O. 406.660.**

**RENOVIGU LA ABONON**

**POR JARO 1935!**

**PRENUMERATA:** rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

**OGŁOSZENIA:** 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO:** KRAKOW, LUBICZ 34.

**ABONO:** jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

**ANONCOJ:** 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

**KONTO P. K. O. NR. 406.660**